

MONDPACO

KAJ

ŜANTUNA DEMANDO

ELDONO DE INTERNACIA RILATO-KOMITATO

DM-00105

MONDPACO
KAJ
ŜANTUNA DEMANDO

ELDONO DE INTERNACIA RILATO-KOMITATO

Adreso :

5 Mao-Tao Strato, Nankino, Ĉinio.

1928

ANTAŬPAROLO

Ŝan tuno estas unu province de Ĉinio. La alilandanoj, preskaŭ ĉiuj, memoras ke Ĉinio havas du granduloj en antikva tempo, "Konfucius" kaj "Mencius" kaj ĉiuj pilgrimantoj alilandaj soifante volas viziti ĉiun postsignon de ili. Jen la provinco Ŝantuno estas la hejmo de ĉi-tiuj du granduloj. Ŝantuno, kvankam en antikva tempo jam fariĝis konata pro la du granduloj, tamen ĝis nun ĝi ankoraŭ ne estas plej civilizacia. La plej multo da popoloj nun restas fortaj, bravaj kaj restas bonaj kamparanoj kaj bonaj soldatoj, edukado ne estas tiel progresa kiel en la sudaj provincoj. Karbo, silko, tritiko kaj fruktoj estas la gravaj produktaĵoj de Ŝantuno, sed la popoloj restas ankoraŭ malriĉaj. Pro la malriĉeco la alilandanoj ne tiel zorgas kiel la provincon Kiansu, en kiu la komercado estas treege progresa ekzemple en Ŝanhajo. Sed en realo Ŝantuno tute ne estas tiel senfruktdona, ĝi nur neplendisvolviĝa. Kaj la situacio de Ŝantuno en politiko estas ege grava. Oriente ĝi havas havenojn apud Flava Rivero, de la orienta ekstremo estas fervojo nomata Ŝantuna fervojo, longe preskaŭ 250 mejloj, kuniĝanta kun la plej granda fervojo nomata Pekin-Pukoŭ-fervojo, kiu en la norda Ĉinio kuniĝas kun la fervojoj al ekstremoj nord-orienta, nord-okcidenta, sud-orienta kaj sud-okcidenta. La plej granda kanalo pasas en ĝi, la granda "Flava Rivero" eniras en ĝin kaj de ĝia orienta ekstremo enfluas en la maron.

Vidante la gravecon de Ŝantuno en la komercado kaj politiko, Germanio en 1897 luis Kiaocoŭ-Golfo'n de Ĉinio por kolonii kaj komerci. Do Japanio estas plej proksima najbaro de Ĉinio, kaj ĉi-tiu golfo estas plej proksima al Japaio, ĝi deziris havigi al si jam delonge. Pòst la luigo al Germanio ĝi ĵaluzas ĉiam. Dum la mondmilito, ĝi havis okzon, tuj proklamis kontraŭstari al Germanio kaj ekspedis armeojn per militŝipoj al Kiaocoŭ Golfo por ataki germanojn. Sed ĉi-tiun tempon Ĉinio ankaŭ proklamis militon kontraŭ Germanio, Japanio devigate proklami ke se ĝi venkos kaj akiros la teritorion luigitan al Germinio, ĝi redonos al Ĉinio kaj rifuzis al Ĉinio ke ankaŭ sendi armeojn por ataki ne estas bezone kaj konvene. Tamen tio nur estis fanfaronaĵo kaj artifiko de Japanio, ĝi ne nur rabis la akiritan teritorion post venko, ĝi eĉ rigardis Cinano'n la ĉefurbo de la provinco kaj ŝantunan fervojon kiel siajn propraĵojn, kiujn ĝi okupis dum la milito pretekstante por ĉirkaŭataki la germanojn. Malgraŭ la oftaj protestoj de Ĉinio, eĉ Cinanon kaj la fervojon ĝi ne volis redoni al Ĉinio, restigis armeojn kaj kontrolis ĉion. En la 7an de Majo, 1915 Jpanio donis

al Ĉinio minacan ultimatumon kun *dudekunu postuloj* kaj limigis la tempon por respondi nur en dudek horoj. Kiel en ĉi-tiuj dudekunu postuloj Ĉinio ne nur ne povis akiri la perditaju rajtojn, eĉ devigite doni al Japanio aliajn grandajn kaj gravajn profitojn. Tio kaŭzis la grandan koleron kaj indignon al Ĉinoj kaj tumulto audiĝis ĉie, la lernantoj ĉesis lernadon, komercistoj fermis siajn butikojn, laboristoj forlasis laborejon, ĉiuj kunvenis, amasiĝis por kontraŭi Japanion, kaj fine la bojkoto komencis, neniu plu aĉetis japanajn aĵojn kaj neniu plu komunikis kun japanoj. Tiam la Ĉina Registaro ne estis fortika, ĝi eĉ ŝanceliĝis sub la premo de Japana Registaro, sed pro la kolero de popoloj, ĝi fine rifuzis la ultimatumon. Kaj de tiam la Ŝantuna demando restis sendecidita. En la jaro 1922, post la fino de mondmilito, en Vaŝintono okazis konferenco de multaj nacioj kaj Ĉinio proponis la ŝantunan demandon por solvi. Tra la multaj malfacilecoj la demando estis decidita, Ĉinio kun Japanio faris traktaton kaj la perditaj rajtoj estis redonitaj al Ĉinio, Japanio retiris siajn armeojn, lasis la kontrolecon al Ĉinio.

Sed Japanio nun estas tre forta, unu el la grandaj Potencoj, la nuna Ministro Tanaka havas la kutimon postlasitan de antaŭa soldata vivo, sin apogante sur la potenco li kondukas la Japanan Registaron al la invada vojo de imperalismo, premas Ĉinion per ĉiuj penadoj vidante ĝian malfortecen. Dum la konfuza ŝancon en Ĉinio kiam la Naciista Partio kondukante la Naciistan Revorucion plenumas la Nordan Ekspedicion, ĝi helpas la nordajn militdiojn por akiri la specialajn rajtojn. Tial en Majo, lastjare, vidante la danĝeran ŝanceliĝon de la nordaj armeoj en suda parto de Ŝantuno, ĝi ekspedis armeojn al Ŝantuno, okupis Cinanon kaj la tutan longecon de Ŝantuna fervojo, pretekstante por protekti japanajn loĝantojn en Ŝantuno. Post la sukceso ĝi ĝoje retiris siajn armeojn post kelkaj monatoj.

Tamen la Naciista Registaro penadas ĉiam por sia celo, ĉi-tiun jaron ĝi denove direktigis siajn armeojn al Ŝantuno, kaj eĉ preksimiĝis al Cinano, la centro de la provinco Ŝantuno. Pro la malsukceso de sia artifiko, Japanio ree ekspedis armeojn al la provinco, kaj kruele buĉadis.

Potencoj estas multaj krom Japanio, ekzemple Amiriko, anglio, Francio, k. t. p., ĉiuj havas treegan forton, sed tian agon senrezonan hontaĵon nur povas fari Japanio. Se ne ĉesos tian arbitran invadan maljustan agon, Japanio evidente estos la kulpulo de estonta mondmilito.

Ĉar tio estas klara, se ne ekzistus justeco en la mondo, se Japanio povus sendi armeojn al ĉinajn teritorioju,

kie loĝas siaj nacianoj kaj pretekste rabus tiujn lokojn, la aliaj nacioj ankaŭ povus sendi armeojn kaj rabi Ĉinajn teritroriojn, kaj tiam ĉiuj nacioj reciproke malpacus pro la bonaj pecoj, ekkaŭzos ne nur militon en Ĉinio, sed ankaŭ en la mondo; aliflanke, se la justeco ekzistus en la mondo, la justaj kaj malgrandaj malfortaj nacioj certe sin ligos kaj kontraŭos la Japanan Registaron, ankaŭ kaŭzos mondmiliton.

Do ŝantuna demando ne nur estas demando inter ĉinio kaj Japanio, ĝi estas monda, internacia.

ENHAVO

Antaŭparolo
Japanio triafojon ekspedis armeojn al Ŝantuno.
La deklaracio de Japana Registaro.
La protesta noto de Naciista Registaro.
Noto de Naciista Registaro kontraŭ Japanio.
Kion forgesis la Japana Registaro.
Manifesto de Naciista Partio al la tutmondo.
Manifesto de Naciista Partio al japanaj popoloj.
Kion ne kredas kaj ne konfidas la japanoj.
Riproĉoj de japanoj kontraŭ Japana Registaro.
Kruela buĉado de japanaj armeoj en Cinano.

Kiamaniere la japanaj armeoj incitis la naciistojn, malhelpante ilian marŝon dum ili venkis. Kiel orde kaj pace la naciistoj eniris en la urbon, cinanon. Kiel komencis la kruela buĉado. Kie preparis la venenan artifikon. Kiel buĉadis kaj atakis japanaj armeoj ĉinajn civilanojn kaj soldatojn. Japanoj detruis ĉinan senfadenan stacion en Cinano por rompi veran raporton al ekstera mondo. Pro la paco naciistaj armeoj fortiriĝis de Cinano al la fronto. Japana ultimatumo kun kvin sensencaj postuloj por daŭrigi kruelan buĉadon. Kiel daŭris la kruela kaj sovaĝa atako kontraŭ naciistaj soldatoj en murita urbo.

Protesta Noto de Ĉina Ministro el Cinano.
Plendo de Naciista Registaro al la Ligo de Nacioj.
Plendo de Naciista Registaro al la Prezidanto de Usono.
Manifesto de Naciista Partio al la popoloj de ĉiuj amikecaj nacioj.
Alvoko de Nankina Esperanto-Asocio.
Deklaracio de Ŝanhaja Esperanto-Asocio.

Japana Registaro senĉese ekspedis armeojn landajn kaj marajn en ĉinajn enlandojn.
Deklaracio de Japana Registaro pro la aldona ekspedo.
Deklaracioj de japanaj modernaj partioj kontraŭ Japana Registaro.
La venko de Norda Ekspedicio de naciistaj armeoj kaj la minaco de Japana Registaro.
Minaca Noto de Japana Registaro pro la revolucio en norda Ĉinio.
Noto de Ĉinio kontraŭ Japana.

Lokoŭo
Ĉancuano
Ciho
Ĉencuano
Ĉoŭcuno
Tiencin-Pukoŭ-Fervojo
28 Li
Ŝincuano
26 Li
7 Li
Cinano
Cintao-Cinan-Fervojo
Ĉantieno
8 Li
14 Li
10 Li
Ĉankiacuano
18 Li
10 Li
Pei-Ma-San
Vanŝantieno
50 Li
18 Li
30 Li
44 Li
Hin-Lun-San
Ĉancino
Tankiacuano
140 Li
Ĉaomitieno
Takuŝano
110 Li
Van-Ho (Flava Rivero)
Tiencin-Pukoŭ-Fervojo
Kueitehĉeno
Taiano
KARTO DE
CINANA AREO
1 li = ⅓ mejlo

Barono Giiĉi Tanaka, Japana Ĉefministro kaj Ministro de Fremdaj Aferoj.

Hikonosuke Fukuda, Komandanto de Japanaj Armeoj.

Sro. Cai Kun-Ŝih, Komisionano de Fremdaj Aferoj por Ŝantuno, mortigita de japanaj soldatoj post detranĉo de liaj nazo kaj oreloj, en Cinano, je la 3a, Majo. Sro. Cai naskiĝis en 1888 en Kiukiano de la provinco Kiansio. Li estis edukita en la Imperia Universitato de Japanio, kie li ricevis diplomon de Magistro de Arto. Li sin specialigis en ekonomiokaj politiko, kaj aliĝis al la revorucia partio, Tun Min Vei, sub Dro. Sun Jat-Sen. Dum la eksplodo de la 1911 revorucio en Vuĉano, li estis Direktoro de Komunikado kaj poste Ĉefdirektoro de Importa Imposto-Ofcejo en Kiukiano. Poste li iris al Kantono kaj fariĝis konsilanto de Dro. Sun Jat-Sen, tiama Generalisimo de Kantona Registaro. En la printempo de la jaro 1927, li estis Ĉefdirektoro de Doganejo en Nankino kaj samtempe, Komisionano de Fremdaj Aferoj. Antaŭ nelonge li estis Direktoro de Diplomata Oficejo fiksita al la Politika Komitato en la milita zono. En la la de Majo, jus post la kapto de Cinano, Sro. Cai estis Komisionano de Fremdaj Aferoj por Ŝantuno ordonita de Naciista Registaro.



ORDONO DE GENERALO FUKUDA

ORDONO DE GENERALO FUKUDA

Dum la pasinta eksplodo, vi ĉiuj, oficistoj kaj soldatoj, eĉ ne perdinte unu sekundon efektivigis la ordonojn, mi sentas treegan kontenton pri via braveco en ĉiu okazo kaj via kapablo venkinta multajn superajn malamikojn Ĉi tio elmontras nian militistan gloron kaj la plenumon al la devo de la protekto al niaj nacianoj. Samtempe nia koro estas plenplena de profunda malĝojo pro tiuj militistoj kiuj pagis siajn vivojn por plenumi la devon.

Zorgeme ekzameninte vian aktivecon dum la pasinta eksplodo, mi vidis ke vi kapablis trovi la ŝancon tra la bagatelaj aferoj kaj renkonti al la situacio kun firma decido. Mi estas ĝoja ke la edukado doninta al vi en ordinaraj tempoj nun naskis la deziratan rezultaton.

Pro niaj direktoj ĉiuflankaj la movo ne devas esti izolita, vi devas kompreni la ĝeneralan situacion kaj sindeteni la malprudentajn agojn. Tamen, por montri militistan forton, vi devas preni la decidan agon kiam kiu ajn intencas malhelpi nian movon kaj difekti nian militistan honoron.

Deposte, vi estos tion atenti kaj duobligi vian lojalan penon por efektivigi la gravan mision de n'a milita ekspedicio al Ĉinio. Kiam la nuna situacio donas signon de la pacebla paŝo, vi neniel povas esti optimitistaj pri la atingo al nia celo. Vi devas kompreni nian mision kaj estu kuraĝaj konstante.

La 4an de Majo, 1928.

貴總司令カ屢次中外ニ聲明セラレタル
意思ニ反シ今次貴部下正規軍ニ依リ
見ルニ忍ヒサル不祥事件ノ實現セラレタルコトハ
本司令官ノ遺憾ニ勝エサルトコロニシテ其ノ帝國
軍隊及居留民ニ對シ加ヘラレタル一切ノ損
害竝國家ノ名譽毀損ニ關スル賠償其ノ
他ハ他日帝國政府ヨリ改メテ交涉スルトコロア
ルヘキモ本司令官トシテ不取敢左記事項ヲ
貴總司令ニ要求ス

一、騷擾及其ノ暴虐行爲ニ關係アル高級
武官ノ嚴ナル處刑

一、日本軍ノ面前ニ於テ我軍ニ抗爭シタル
軍隊ノ武裝解除

一、南軍治下ニ於テ一切ノ反日的宣傳其ノ
他ノ嚴禁

一、南軍ハ濟南及膠濟鐵道兩側沿線二十
支里以外ノ地ニ離隔

一、右實行ヲ監視スル爲十二時間以內ニ辛莊
及張莊ノ兵營ヲ開放

右十二時間以內ニ回答セラレタシ

昭和三年五月七日午時 臨時山東派遣第六師團長福田彥助

蔣總司令閣下

JAPANA ULTIMATUMO KUN KVIN POSTULOJ ĐATITA JE LA 7a, MAJO, 1928.

JAPANA ULTIMATUMO KUN KVIN POSTULOJ

(Traduko)

Malgraŭ viaj ripetaj deklaracioj rilate al la protekto al la vivo kaj proprajo de alilandanoj en Ĉinio, la armeoj sub via komandanto, bedaŭrinde, faris malfeliĉajn aferojn. Forlasante la demandojn de kompenso, bedaŭresprimo kaj de la aliaj, kiujn la Imperia Japana Registaro demandos en estonteco, nun por la suferoj de la japanaj loĝantoj kaj de la armeoj en Cinano kaj por la difekto al la glora nomo de la Japana Imperio, mi ĉi-tie prezentas jenajn postulojn:

1. Puni la ĉefajn militoficistojn, kiuj estis rilataj al la okazaĵo.
2. Senarmigi ĉiujn naciistajn armeojn, kiuj ĝenis japanojn, antaŭ la japanaj armeoj en Cinano.
3. Forte malpermesi kontraŭ-japanajn propagandojn en la teritorioj sub la regado de naciistaj armeoj.
4. Fortirigi ĉiujn naciistajn armeojn en la areo proksime 20 "li" de Cinano kaj 20 "li" laŭlonge de la Cinan-Cintao-Fervojo.
5. Fortiri ĉiujn naciistajn armeojn, kiuj restas en Ŝinĉuano kaj Ĉanĉuano, en dekdu horoj.

Via respondo al la supraj postuloj estu liverita en dekdu horoj.



昨五月七日午後四時本司令官ヨリ貴軍代表ニ手交シ貴總司令ニ提示シタル五ヶ條ノ要求條件ニ對シ十二時間以内ニ回答セラルヘキ旨通告致シ置キタルニ本八日午前四時ニ至ルモ貴總司令ヨリ正式ノ回答ニ接セサルヲ以テ本司令官ハ貴總司令ニ於テ事件解決ノ誠意ナキモノト認メ軍ノ威信上已ムナク斷然タル處置ニ出テ以テ要求ヲ貫徹セントスルモノナリ

右通告ス

昭和三年五月八日

臨時東派遣第六師團長福田雅太郎

蔣總司令閣下

INFORMO DE FUKUDA DATITA JE LA 8a, MAJO, 1928.

INFORMO DE FUKUDA

(Traduko)

Hieraŭ, je la kvara p. t. m. ĉi-tie, la Komandanto de Japanaj Armeoj donis al viaj reprezentantoj leteron kun kvin postuloj kaj templimigis la respondon en dekdu horoj. Sed ĝis nun, je la kvina, matene, mi ankoraŭ ne ricevis la formalan respondon. Do vin informas nun ke, ni necesas preni la decidajn rimedojn por subteni la honoron de niaj armeoj kaj atingi nian celon, vidante la fakton ke vi ne havas sincerecon por trovi la solvon de la afero.

Hikonosuke Fukuda,

Cinano, la 8an de Majo, 1928. Komandanto de Japanaj Armeoj.



本司令暴以濟南及膠濟鉄路保安起見對於南北兩軍當有一律不許進入沿線二十里以內作戰及破壞之聲明今後關於南軍退出之地方本司令負有維持治安之重任敢願嚴重實行至於日軍軍紀之糾察整頓務期秋毫無犯惟本城內外之治安轄由於本地方治安警察總局維持之仰一般市民尊各安居樂業勿自驚擾此佈

日軍總司令福田彪助

昭和三年五月十二日

JAPANA PROKLAMO DATITA JE LA 12a, MAJO, 1928.

JAPANA PROKLAMO AL LA LOĜANTARO

(Traduko)

Tion ni jam deklaris ke la ambaŭaj nordaj kaj sudaj ĉinaj soldatoj estas malpermesitaj eniri en la areon proksime 20 "li" de Cianon kaj 20 "li" laŭlonge de la ambaŭaj flankoj de la Cintao-Cinan-Fervojo, pro la sendanĝerco de la urbo kaj de la fervojo.

Deposte, la paco kaj ordo de ĉi-tiuj distriktoj, kiujn nun forlasis la sudaj armeoj, estas efektive observataj de japanaj soldatoj kiuj estante bone disciplinaj ne kaŭzos ian ajn konsternon al la popolo. La lokaj policistoj dum la tempo sinŝarĝas la devon de la subteno de la paco kaj ordo en la urbo de Cinano.

La civitanoj en Cinano estas avizataj ne sin ĝeni sed vivi kiel en la ordinara tempo kaj daŭrigi siajn okupojn.

Hikonosuke Fukuda,
Komandanto de Japanaj Armeoj.

Cinano, la 12an, Majo, 1928.


告示

日本軍現在駐屯在濟
南無論南北兩軍均在
濟南之周圍二十里地
以內禁止擅入
若是不得日本軍之許
可進入者立即解除武
裝

昭和三年
五月二十日

濟南警備總司令官
福田彥助

JAPANA PROKLAMO DATITA JE LA 20a, MAJO, 1928.

PROKLAMO

(Traduko)

Cinano nun estas okupita de japanaj armeoj, nordaj soldatoj aŭ sudaj estas malpermesitaj eniri en la areon proksime dudek "li" (7mejloj) de Cinano.

Kiu ajn ĉina soldato, enirinta en la dirita areo sen permeso de Japana Komandanto, estos tuj senarmigita.

Hikonosuke Fukuda,
Komandanto de Japanaj Armeoj.

Cinano, la 20an de Majo, 1928.

Sui-Cin strato, Cinano, la plej difektita parto en la urbo. Pli ol 500 domoj de pli ol 100 familioj estis ruinigitaj de japanaj bombardiloj sen escepto. Pli ol 30 personoj estis mortigitaj. En la domoj kaj butikoj nun restas nenio.

Alia bildo montras la plej difektitan parton en la urbo, Cinano.

La Okcidenta Pordego de Cinano, ruinigita de japanaj bombardiioj.

La Orienta Pordego de Cinano difektita de japanaj bombardiloj.

La komerca areo, Cinano, okupita de japanaj soldatoj.

Angulo de Er-ta-ma-lo kaj Vais-lo okupita de japanaj soldatoj, Cinano.

Unu el la japanaj kirasoaŭtomobiloj preter pasis sur la ĉefstrato ekster Okcidenta Pordego, Cinano.

Bildo montras grupon da japanaj militistaj oficistoj sur la Suda Pordego de Cinano, post ilia okupo en la urbo.



Japanaj gardistoj sur la supro de urbmuro kiu jam estis rompita de iliaj bombardiloj, Cinano.



La malnova oficejo de ĉina militestaro okupita de japanaj soldatoj



Ĉinaj senarmigitaj soldatoj fariĝis malliberuloj kaj gardataj de japanaj soldatoj kun celantaj ponardoj.

Grupo da ĉinaj senarmigitaj soldatoj puŝataj de japanaj soldatoj preter pasis sur la ĉefstrato en Ĉinano.

Cambro en la Milit'sta Posta Hospitalo, Cinanc, kie naciistaj malsanaj kaj vunditaj soldatoj estis mortigitaj de japanaj soldatoj.

Alia bildo montras la buĉadon de japanaj soldatoj en la Militista Posta Hospitalo, Cinano.

Cinaj civilanoj mortigitaj de japanaj soldatoj.

Cinaj civilanoj mortigitaj de japnaj soldatoj.

Cinaj civilanoj mortigitaj de japanaj soldatoj.



Cinaj virinoj mortigitaj de japanaj soldatoj.





Ĉinaj knaboj kaj **knabinoj mortigitaj de japanaj** soldatoj.

Mortigitaj sur sendanĝera kampo.

KLARIGO

Ĉi tie ni nur enmetas malgrandan parteton da fotografaĵoj kaj klarigas al la legantoj ke kiujn gajni estas tre malfacile. Ĉar post la buĉado japanaj soldatoj ja ĉie gardis kaj ne permesis al ni ĉinoj fotografi pro la malkaŝo de ilia faro. El tiuj kiuj fotografis kelkaj jam pagis siajn vivojn.

JAPANAIO TRIAFOJON EKSPEDIS ARMEOJN AL ŜANTUN

La 13an de Aprilo, 1928, Japana Registaro ree decidis ekspedi armeojn al Ŝantuno, kaj la destinitaj tuj ekmoviĝis. La celo estis, kiel ĝia deklaro, protekto al japanoj loĝantaj en Ŝantuno. La nombro de destinitaj soldatoj estis kvin miloj el Japanio kaj tri aroj (ĉirkaŭ 600 personoj) tirigitaj el norda Ĉinio. La destinita sumo por ĉi-tiu ekspedo estis 2,900,000 jen (japana dolaro).

Ĉi-tiu fojo jam estas la tria.

La unua ekspedo okazis en la jaro 1914, dum la mondmilito. Sub la Angla-Japana Ligo, Japanio ekspedis armeojn por ataki la germanojn en la luigita de Germanio areo de Kiaĉoŭ en la orienta ekstremo de Ŝantuno provinco. Kaj dum tiu okazo Japanio ne atentis la rajton de Ĉinio ke ĝi estas neŭtrala ŝtato, ne nur okupis la luigitan areon kun la ĉefurbo kaj haveno de Cintao, eĉ prenis la tutan longecon de la fervojo kuranta de Cintao al la ĉefurbo de la provinco, Cinano, ĉirkaŭ tricent mejloj, kie ĝi kuniĝis kun la ĉefaj fervojoj kurantaj de norda Ĉinio tra Pekino kaj Tiencino al Ŝanhajo. Japanio, prenis la lokojn kiel proprajn havaĵojn kaj regis ĉion. En la jaro 1915, post Ĉinio donis duan proteston al Japanio, Japanio donis *Dudekunu Postulojn* kun ultimatumo minacis al Ĉinio. Post seriozaj rifuzoj, la Ŝantuna demando fariĝis sendecidita ĝis la jaro 1922. Fine, dum Vaŝintono-Konferenco ĝi estis solvita kaj japanaj armeoj estis retirigitaj.

La dua ekspedo de japanaj armeoj al Ŝantuno okazis en Majo, 1927. La celo estis sama kiel nuna: protekto al japanoj loĝantaj en Ŝantuno. La nombro de destinitaj soldatoj estis 6000, retirigitaj en Septembro kaj elspezita sumo estis 20,155,000 jen, La cirkonstanco en Ŝantuno estis sama kiel nuna: la naciistaj armeoj proksimiĝis al Cinano, la Ĉefurbo de Ŝantuno provinco, kaj la armeoj de 1' militdioj venkite ŝanceliĝis. Kvankam la Japana Registaro pretekstis ke la armeoj ekspeditaj al Ŝantuno estis por protekti la japanajn loĝantajn en Ŝantuno, tamen

oni estas tute klara ke ĝi volas malhelpi la revolucion naciistan. Ĉar se sukcesos la naciista revolucio kaj unuiĝos ĉinaj popoloj sub la Naciista Registaro t. e. finiĝos la konfuzo, kiel la imperialismaj registaroj diras, de Ĉinio, tiam la imperialismaj registaroj nenian eksterodinaran profiton povos akiri kiel nun. Tio ja estas la sola rimedo de ĉiuj imperialismaj registaroj: Longigi la internan konfuzon de Ĉinio. Japanio estis triumfinta en lastjaro. La Norda Ekspedicio de Naciistaj armeoj estis efektive interrompita de ĝi. Post la malsukceso de naciistaj armeoj, vidante sukceson de sia artifiko, la Japana Registaro trankvile retiris siajn armeojn en Septembro. Sed, bedaŭrinde, la naciistaj armeoj sub kiel ajn malfacileco penas plunumi sian devon, ili ree atingis Ŝantuno; eĉ la ĉefurbon, Cinanoj, kaj fine plenumis la Nordan Ekspedicion tra la malhelpoj de Japana Registaro.

Nun ni legu la deklarcion de Japanio pri ĉi-tiu ekspedo de armeoj al Ŝantuno:

LA DEKLARACIO DE JAPANA REGISTARO

Tiam kiamj apanaj armeoj estis retirigataj, Japana Registaro jam deklaris ke ĝi ne intencas helpi kiun ajn partion aŭ partieton, dum milito okazas en ĉinio, sed, se la paco kaj ordo en tiuj lokoj kiuj konsistasel multe da japanaj loĝantoj estus maltrankviligataj kaj naskus la kaŭzon de teruro ke la sendanĝereco de la diritaj loĝantoj estos disrompata, Japana Registaro estos devigata preni tian rimedon de sinprotekto laŭ la postulo.

Vidante la eksterdinaran ŝanĝon de la situacio en Cinano, kiu estos ĵetita en maltrankvilon kaj minacata envolviĝi la loko, en kiu japanoj restas, Japana Registaro nun estas devigata plenumi la suprediritan deklaracion, ekspedi el Japanio soldatojn ĉirkaŭ 5,000 al Kiaoĉoŭ-Ĉinan-Fervoja zono tra Cintao por protekti la japanajn loĝantojn. Sed antaŭ la alveno de ĉi-tiuj soldatoj, tri aroj en norda Ĉinio estas tirigataj al Cinano por plenumi la urĝan rimedon.

Tion apenaŭ necesas diri ke la ekspedo de armeoj de Japana Registaro ree al la distrikto de Ŝan-

tuno estas neevitebla rimedo de simprotekto, ke ĝi ne intencas ian neamikecon al Ĉinio kaj al ĝiaj popoloj, kaj ke ĝi ne intencas malhelpi la militajn aferojn de nordaj aŭ de sudaj armeoj. Nun devas aldoni ke tiam kiam Japana Registaro konsideros tion ne necesa, restigi la armeojn por protekti la japanajn loĝantojn en la loko suprecitita, la armeoj estos tuj retirigitaj simile al la lasta okazo.

La 20an de Aprilo, 1928.

Bonega estas ĉi-tiu deklaracio. La vorto "protekto" belsonas kaj la vero, la justeco kvazaŭ ensorĉita en ĝi. Sed bedaŭrinde, la Japana Registaro ion forgesis: Ŝantuno estas ĉina teritorio, propra tero de Ĉinio, ne de Japanio. Tio estus sufiĉe belega, ankaŭ sufiĉe terurega, se ĉiuj nacioj en la mondo ankaŭ tion forgesus kaj ekspedus armeojn aŭ almenaŭ soldatojn sekvante siajn nacianojn en ĉiujn landojn de aliaj nacioj.

Nun ni vidu la protestojn de naciista Registaro:

LA PROTESTA NOTO DE NACIISTA REGISTARO.

La Japana Registaro, en Majo lastjare, kiam la Norden Ekspedicianta armeoj de Naciista Registaro Proksimiĝis al la provinco Ŝantuno, subite ekspedis armeojn en tiun provincon. Rigardant ĉi-tiun agon de Japana Registaro kiel invadon al sia teritoria rajto kaj kiel perfidon ne nur al la principoj de internacia leĝo sed ankaŭ al la traktataj kondiĉoj, Naciista Registaro donis proteston al la Ministro de Fremdaj Aferoj de Japana Registaro. Kvankam la armeoj senditaj de Japanio estis retirigitaj poste, tamen la sento de Ofendiĝo pri tiel serizoa invado estas ankoraŭ restanta en la koroj de ĉinaj popoj.

Depost la stariĝo de Naciista Ragistaro en Nankino, ordonoj por fortprotekti la vivon kaj propraĵon de la loĝantoj de amikecaj nacioj estis ripete donitaj al la militistaro kaj al la lokaj registaroj. Dum la Kvara Plena Kunveno de Centra Ekzekutiva Komitato de Kuomintan okaze en ĉi-tiu printempo, definitiva deklaracio estis farita pri la sama temo. Antaŭ ne-longe, Generalo Ĉian Kai-Ŝek, la ĉefkomandanto de naciistaj armeoj, elsendis el sia stabejo oficialan proklamon ordonantan al ĉiuj naciistoj tutforte protekti la

fremdajn vivon kaj proprajon. Ĉi-tiu proklamo estis telegrafita al la Komisionano de Fremdaj Aferoj Por Kiansu je la 16a de Aprilo ĉi-tiu jare, kaj la Komisionano estis ordonita peti la Japanan Konsulo-Generalon en Ŝanhajo transigi la suprediritan proklamon al Japana Registaro. Plue, en la pasintaj monatoj la Ministro de Fremdaj Aferoj de Naciista Registaro pene klopodis pri la solvo de ĉiuj nedeciditaj demandoj rilate al la amikecaj nacioj laŭ la diplomotio de Naciista Registaro, kun la spirito de honesteco kaj sincereco, dezirante forigi la malkomprenajojn kaj pliigi la amikecajn rilatojn.

Sed, Bedaŭrinde, Japana Registaro tute nerimarkis la faktojn suprecititajn kaj en tiu tempo kiam la naciistaj armeoj duafoje komencigis la Nordan Ekspedicion, kaj kiam la celo de ĉina unuiĝo estas plenumota, ree proponas ekspedi armeojn al Ŝantuno. Evidente, Japana Registaro erarrigardas la situacion kiel en la lasta Majo. Sed ĝi ne konvenas al rezono nek al kondiĉo, kaj ne nur ruinigas la principojn de internacia leĝo kaj la kondiĉojn, traktatojn, sed naskas ankoraŭ la timon ke leviĝos seriozaj rezultatoj, kiujn kiu sinŝarĝi estos malfacile decidita.

Naciista Registaro nun ne povas kompreni la celon de la ago prenita de Japana Registaro. Se tio estas por eviti la eksterordinaran danĝeron de japanoj en milita zono, rimedoj povas facile elpensotaj por garatii ilin en konformeco, laŭ la kutimo internacia. Ne turnante al tiu vojo, Japana Registaro elektis ripeti sian antaŭan agon, sendis armeojn al Ĉinio. Kontraŭante tiun paŝon, la Ministro de Femdaj Aferoj de Naciista Registaro estas devigata doni al la Ministro de Fremdaj Aferoj de Japana Registaro fortan proteston kaj en la sama tempo havas la honoron peti al Japana Registaro atenti la amikecajn kaj bonecajn rilatojn inter la du popploj, rekonsideri sian agon, kaj tuj haltigi la sendon de armeoj destinitaj al Ŝantuno, por konservi la korajn parencecojn ekzistantajn inter nacioj.

La Ministro de Fremdaj Aferoj de Naciista Registaro havas la honoron prezenti tiun Noton en la espero ke la Ministro de Fremdaj Aferoj de Japana Registaro atentos la enhavon de ci-tiu Noto kaj lin favoros per respondo.

Nankino, la 21an de Aprilo, 1928.

NOTO DE NACIISTA REGISTARO KONTRAŬ JAPANIO

——Instruo al la Komisionano de Fremdaj Aferoj por Kiansu——

En via raporto vi diris ke, komunikaĵon transigis al vi Japana Konsulo-Generalo en Ŝanhajo je la 21a, Aprilo, instruita de Japana Ministro por Fremdaj Aferoj kiel jene:

(vidu la "deklaro de Japanio")

Ke la Japana Registaro, dum la duafoja Norda Ekspedicio de la naciistaj armeoj, ree ekspedas armeojn al Ŝantuno, ne nur perfidas kiu principojn de internacia leĝo kaj traktatajn kondiĉojn, sed ankoraŭ levigos seriozajn rezultatojn, kiujn kiu sinŝarĝi estos malfacile decidita.—pri ĉi-tio, forta protesto estis sendita je la 21a, Aprilo, trans Japanan Konsulon en Nankino al Japana Ministro por Fremdaj Aferoj. La Ministro estas tre surprizita, leginte la argumenton en la supremetita deklaracio sendita de Japana Ministro por Fremdaj Aferoj, por justigi la ekspedon de japanaj armeoj.

Kiam ajn la internaj militoj kaj katastrofoj minacas al la vivoj kaj propraĵoj de fremdaj nacianoj, loĝantaj en tiulando, nur du vojoj etendas antaŭ ili: unue, resti kun konfido al la protekto de tiu Registaro, due, obei la ordonojn de tiu lando, en kiu ili restas, translogiĝi en sendanĝerajn lokojn por kelktempoj. Tio estas plej kutima inter nacioj. Evidente, neniu regno en la mondo povas garantii ke malordo kaj konfuzo neniam okazos en sia lando. Se regno "A" pretekste pro la danĝero de la vivoj kaj propraĵoj de siaj nacianoj, sendus armeojn al regno "B" por protekti siajn loĝantojn, tiam ne nur invadus la rajton teritorian, sed ankoraŭ levigos tian rezultaton ke regno "B" ektimos ke ĉiuj lokoj en ĝia teritorio, kie restas kaj komercas la nacianoj de "A", estos invadataj de regno "A" por ĉiam. Kaj la rezultato estos tiel, ke la politikoj de regno "B" por la malfermi la komercajn havenojn, por disetendi la internacian komercon, por evolui ĝiajn naciajn provizojn per la fremdaj kapitaloj, kaj tiel plu, estos forte frapitaj, kaj la popoloj de regno "B"

rigardos la ĉeeston de nacianoj de regno "A" kie ajn en ĝia teritorio kun alarmo. Ĉio ĉi-tio estas malutila al ambaŭ regnoj.

Cetere, rigardante la nunajn cirkonstancojn de fremdaj nacianoj en la militzono, la naciistaj armeoj jam havas specialan atenton pri ilia protekto por ke la danĝero ne renkontu ilin. Eĉ se la cirkonstancoj malfeliĉe ŝanĝiĝos seriozaj, la tempo estos sufiĉe por serĉi aliajn sendanĝerajn lokojn. Sed la Japana Registaro en tiu tempo ree arbitre ekspedas armeojn al nia regno. Tio estas nenecesa laŭ la cirkonstancoj, kaj tio estas direkte atakanta sur la rajton mastran de Ĉinio. Tiun agon la Naciista Registaro kaj ĉinaj popoloj ne povas rigardi legitima kaj nenial povas toleri.

Vi estas komunikonta laŭ supreskribita la Japanan Konsulo-Generalon en Ŝanhajo, peti lin transigi kaj peti la Japanan Registanon konsenti la unuan proteston, tuj haltigi la sendatajn armeojn al Ŝantuno kaj retiri la ekspeditajn al tiu provinco.

Nankino, la 26a, Aprilo, 1928.

La unua protesto estis datita je la 21a de Majo, tiam la deklaracon de Japana Registaro ankoraŭ ne ricevis la Naciista Registaro, sed la esenco estas sama.

KION FORGERIS LA JAPANA REGISTARO

Japana Registaro, estas tro forgesema, ĝi jam tute forgesis tion kion ĝi propre subskribis en la Traktato por la Decido de Nedecidita Demando rilate al Ŝantuno en Vaŝintono, dum Vaŝintono-Konferenco, je la 4a de Februaro, 1922.

Sekcio III de Vaŝintono-Traktato tute rilatas la demandon de retirigo de japanaj armeoj. Ĝi entenas tri artikolojn kiel jene:

Artikolo IX-La japanaj armeoj, ankaŭ ĝendarmoj, kiuj nun okupas apud la Cintao-Cinana Fervojo

kaj ĝiaj branĉoj, estos tuj retirigitaj kiam la ĉinaj policistoj aŭ soldatoj estos senditaj por ricevi la protekton de la fervojo.

Artikolo X–La aranĝo de ĉinaj policistoj aŭ soldatoj kaj la retirigo de japanaj armeoj surskribitaj sur supra Artikolo, estos efektivigatj en sekcioj.

La templimo de la plemuno de ĉi-tiu procedo en ĉiu sekcio estos decidita antaŭe de la kompetentaj aŭtoritatuloj de Ĉinio kaj de Japanio.

La tuta retirigado de ĉi-tiuj japanaj armeoj estos plenumita en tri monatoj, se eble, sed kiel ajn, ne pli poste ol ses monatoj komence de la tago de la subskribo de ĉi-tiu Traktato.

Artikolo XI-La japana garnizono en Cintao estos retirigita samtempe, se eble, kiam transigos al Ĉinio la administracion de la antaŭe luigita al Germanio teritorio de Kiaĉoŭ, kaj, kiel ajn, ne pli poste ol tridek tagoj komence de la tago de ĉi-tiu transigo.

Vere estis ke Japana Registaro post nelonge retirigis siajn armeojn. Sed, pro kio ĝi ree sendadas armeojn al Ŝantuno? Ĉu en la Traktato skribis ke Japana Registaro povas ekspedi al Ŝantuno poste? Ne, nenion en ĝi skribis. La kaŭzo de retirigo de japanaj armeoj estis tiel: Ŝantuno estas ĉina teritorio, malpermesita estas alveno aŭ en gi okupado de japanaj armeoj. Krome, en la artikoleto 2a de la Konsentaj Termoj de Reciprok-kompreno aranĝitaj de japanaj kaj ĉinaj delegitoj en la Vaŝintono-Konferenco skribis tiel:

Post la retirigo de japanaj armeoj laŭ la Artikolo IX-XI de la Traktato (Vaŝintono-Traktato) neniu japana soldataro de kiu ajn speco povos resti en kiu ajn parto de Ŝantuno.

Sed pli mirinde estas ke kiel ajn la Naciista Registaro atentigis la Japanan Registaron pri ĉio ĉi-tio, la Japana Registaro nenion rememoris. Kvazaŭ surda kaj blinda ĝi arbitre daŭrigis sian sensencan agon.

Nun ni prezentu du manifestojn de Ĉina Kuomintan, en kiuj oni povos klare vidi la konduton de la reprezentaro de ĉiuj ĉinaj popoloj:

MANIFESTO DE NACIISTA PARTIO AL LA TUTMONDO.

Nun ĉiuj ĉinoj sentas grandan indignon kaj ofendiĝon, eksciinte ke dum Naciistaj armeoj venkante norden marŝas, Japana Registaro sendas pli ol kvin milojn da soldatoj al Ŝantuno. Tia konduto nebezonita kaj eble malbonintenca ne nur detruas la mastran rajton de Ĉinio, sed ankaŭ perfidas la principjn de internacia leĝo.

Ekspedo de tiuj soldatoj por protekti la japanojn tute estas preteksto. Ĉar, la Naciistaj armeoj jam ricevis gravajn ordonojn kaj protektas la vivjn kaj proprojn de l'alilandanoj tutforte. Ne imitante la bonan ekzemplon de Usono, kiu ordonis siajn nacianojm eliri el la militloko, Tanaka Registaro de Japanio sendis tiel multe da soldatoj, superfluis la bezonon, kiun gi pretekstas, kaj tiu afero eble levigos gravajn rezultatojn kaj konfuzjn, kiujn evidente Ĉinio ne povos respondi.

Tamen, pro la internacia amikeco, Naciista Registaro daŭre protektas la vivojn kaj proprajĵojn de ĉiuj alilandanoj, ne intencante ian eksterordinaran.

Pro la sendo de Japana soldataro, Naciista Registaro jam donis fortan proteston. Nun reprezentante ĉiujn ciujn ĉinojn Naciista Partio plendas al la konscienco de justaj nomoj en la mondo, deziregas ke, tia sovaĝa konduto internacieca naskos al vi indignon. Vi, dezirantaj la felicon al homaro, kredeble ne permesas ke la paco orient-azia estos konfuzata de l' invadema kaj egoisma nacio. Ni kredas ke via justa penso internacieca igos vin plenamikece helpi ĉinan popolon, kune balai la embarasajĵojn sur la sukcesa vojo de Naciista Revolucio

Kaj ni certigas al vi ke la naciistaj armeoj en kiel ajn malfacileco batalos kun firma decido por plenumi nian celon, kaj unuigi ĉinojn sub la progresema Naciista Registaro. Sciu vi ciuj, kiuj amas la pacon de l' mondo, kaj deziras felicon al homaro, ke nur sub la unuiĝo de nuna Naciista Registaro ĉinoj povos

eliri el la sufero kaj la paco de oriento kaj de mondo havos protektilon.

Centra Ekzekutiva Komitato
de Ĉina Kuomintan.

La 24an de Aprilo, 1918.

MANIFESTO DE NACIISTA PARTIO AL JAPANA POPOLO

Dro. Sun, prezidanto de nia partio, Kuomintan, antaŭ kvin monatoj de lia morto iris al Japanio kaj tutkore ripetis al Japanoj pri la rilato inter Ĉinio kaj Japanio, por ke vekigu la veran amikecon. Bedaŭrinde li mortis en Marto, 1925, ne proprokule vidis la efektiviĝon de lia espero pri Ĉinio kaj Japanio. Ni, anoj de Kuomintan, obeane la instruon de nia prezidanto, nun daŭrigas la naciistan revorucion, sendas armeojn norden, forigas la militdiojn kaj intencas rekonstrui la nacion bazita sur San-min-ismo por ke ŝarĝu la devon de orient-azia paco kune kun Japanio. Ĉar se Ĉinio unuiĝos sub nia partio, efektiviĝos la planoj por nacia rekonstruo de nia partio, Japanio plej multe havos koncernojn kun Ĉinio. Tian esencon nia prezidanto jam diris detale, kiam li iris al Japanio, kaj la saĝaj, bonaj japanoj kredeble jam konsentis. De tiam kiam komencis la naciista revolucio, japanaj kamaradoj nin helpis multe en la spirito, kaj pro tio ĉina popolo ĉiam havas amikecajn sentojn pri japana popolo, kvankam ili ofte malkontentas al la ago de Japana Registaro; precipe nia partio kaj ĉiuj popoloj ne povas forgesi la aferon ke japanaj popoloj kaj popolaj partioj simpatie propagandis pri San-Min-ismo en pasintaj jaroj kaj penadis malhelpi la kabineton pri la ekspedo de armeoj nun.

Sed, la Japana Registaro, kiam nun venkante marŝas la naciistaj armeoj kondukaţaj de nia

partio, baldaŭ pereos la mili-dioj, Sun Ĉuan-Fan, Ĉan Ĉun-Ĉan kaj Ĉan Co-Lin, subite sendas armeojn arbitre al Kiaoĉou-Ĉinano. Kiel ajn malmulte la armeoj, malmulte la monoj por militistaroj, kaj kiel pretekste en ĝia deklaracio, la invado al ĉina sendependeco kaj ruinigo al ĉina mastra rajto bedaŭrinde jam efektiviĝas. Tian politikon, ni bone scias, certe ne permesas japanaj popoloj kaj ili vere penadas por malhelpi. Domaĝe estas ke la Japana Ministraro sub Tanaka konduko senpripense faras sian arbitran invadan politikon. malĝojante pri la estonteco de amikeco inter Ĉinio kaj Japanio, ni tre simpatias la subtenon de justeco de japanaj popoloj.

Kvankam Tanaka Ministrao subuzas tiun aferon tute por firmigi sian politikan rajton por kelk-tempoj, tamen Japanaj popoloj subpremataj sub la militdioj, certe elektos la pravan vojon por atingi sian evoluon kaj plenumi la spiriton de justeco kaj paco. Ĉar kiel ajn la Tanaka Ministraro rigardas kontente la sensencan agon, malrigardante la volon de ĉinoj invadas ĉinan teritorion, perfidante sian popolan volon ruinigas ĉinan mastran rajton, la popoloj de Japanio kaj Ĉinio neniel povas ĝin toleri. Pri ĉi-tiu afero, Ĉina Kuomintan jam tre bone komprenas, kaj kredas al japanaj popoloj ke ili ĉiam estas niaj bonaj amikoj helpantaj naciistan revolucion, kvankam ni tre miras pri la sensenca ago de Tanaka Ministraro. Sekve Ĉina Kuomintan daŭre protektas la japanojn kiuj loĝas en Ĉinio laŭ la antaŭa spirito de amikeco. Samtempe ni deziras al ĉiuj japanaj popoloj ke ili klopodu pri la rekonstruo de nova sorto en oriento kun ni unukore.

Ne vidante la pli malproksiman antaŭ sia okulo, pli longigas la internan konfuzon de Ĉinio, premante ĉinajn popolojn, malhlpante ĝian movadon por sendependeco, la imperialismoj akiras profiton en tiu ne unuiĝa cirkonstanco-tio estas la komuna eraro de ĉiuj imperialismoj en pasintaj jaroj, kaj tial neniel sukcesis en Ĉinio. Nun la pensfluo de San-Min-ismo jam plenplenas en Ĉinio, dank' al forta penado de ĉinoj, la revoruciista, unuiĝa registaro fine estos konstruita. Vidante la sukceson de ĉina naciista revolucio, nun la militdioj jam pli kaj pli komprenas kaj klopodas ŝanĝi sian agon. La Japana Registaro ankoraŭ

nenion komprenas, tion ni timas pro la paco kaj progreso de oriento, kaj deziras al japanoj havi bonan ridemedon.

Centra Ekzekutiva Komitato
de Ĉina Kuomintan.

La 24an de Aprilo, 1928.

Do prava estas Ĉinio. Ĝi ne imitis la agon de Japanio, ne nur sen kontraŭo plendis al tutmondo kaj al japanaj popoloj, ĝi ankoraŭ vokis kaj atentigis en tia cir konstanco ke, kiel ajn, ĝi proteketas la alilandanojn loĝantajn en Ĉinio, gi cĉ ne havas iom malamikecan intencon al japanoj. Ĉino estas Homamanto, vera pacbatalisto de humanismo.

KION NE KREDAS KAJ NE KONFIDAS LA JAPANOJ.

Pri la preteksto de Japana Registaro evidente klare antaŭvidis la japanaj popoloj, jen estas fortaj atestaĵoj:

JAPANOJ EN CINANO FORIĜAS

Cinano, 20, Aprilo—Parto de la aro maĥin-pafila, pli ol kvardekoj, kaj tri aroj infanteriaj, pli ol kvincentoj el japana garizono en Tiencino je la unua horo post-tagmeze, hidiaŭ, envenis en Cinanon. Sed parto de japanaj loĝantoj ankoraŭ foriĝadas por sin ŝirmi. (Toho Novaĵe-Agentejo)[1]

Cintao, 20, Aprilo-Japanoj loĝantaj en Cinano svarme alvenis al Cintao por sin ŝirmi. (Dempo Novaĵo-Agentejo)[1]

---

[1] Toho kaj Dempo estas oficialaj organoj de Japana Registaro.

Se la ekspedo de japanaj armeoj al Ŝantuno vere estis por protekti la japanojn, japanoj neniel foriĝis for de la loko, kie ili loĝas, alie, se la japanoj foriĝis, la armeoj estis senutilaj. El ĉio ĉi-tio ni povas aserti ke ne nur la ĉinoj trarigardis la celon de Japana Registaro, sed eĉ la japanoj sciis ĝian malbonan intencon.

Krome, ni povas scii la opinion de japanaj popoloj per jenaj novaĵoj:

RIPROĈOJ DE JAPANOJ KONTRAŬ JAPANA REGISTARO

Tokio, 19, Aprilo—Pri la ekspedo de japanaj armeoj al Ŝantuno la opinio de japanaj ĵurnaloj estas malsamaj, sed plej multe insistas ke, pri ĉi-tiu afero la Japana Registaro estu prudenta. La ĵurnalo "popolo" ĝin aprobas, sed insistas ke ĝi estu nur por protekti la japanojn. La „Informo" forte kontraŭas ke ĝi ne nur levigos la kontraŭon kaj suspekton de ĉinoj, eĉ ricevos seriozajn ripročojn de aliaj nacioj. Ili ankoraŭ insistas ke la japanoj en Cinano estu transloĝiĝi al Cintao, ĝis tranviliĝos la cirkomstanco. Aliaj rigardas la situacion urĝa, sed antaŭvidas ke se Japana Registaro ekspedos armeojn al Ŝantuno, la estonteco fariĝos pli danĝera. La "Tempo" en ĉi-tiu okazo serioze kritikas ke, la Japana Registaro havas nenian politikan rimedon al Ĉinio, sekve nenion povas fari, escepte la ekspedon. (Reuter Servo)[1]

Tokio, 19, Aprilo—La "Informo" kritikas ke tio estus sufiĉe, se per la mono destinita por ekspedo sendos militŝipojn por transporti la japanojn en Cinano. La "Mateno" diras ke en nuna tempo, en kiu plej multe malpliiĝas la danĝero, kompare kun la cirkonstanco de nankina afero lastjae, arbitre sendi armeojn estas sensence. (Toho)

---

[1] Reuter Servo estas angla oficiala organo.

KRUELA BUĈADO DE JAPANAJ ARMEOJ EN CINANO

Kiamaniere la japanaj armeoj incitis la naciistojn, Malhelpante ilian marŝon dum ili venkis.

Post la 20a de Aprilo, la naciistaj armeoj venkante alproksimiĝis al Cinano. Parto el ili marŝis al nord-okcidento, parto al nord-oriento, por ĉirkau preni la urbon, Cinanon. Pro la graveco de militafero, la naciistaj detranĉis la Cintao-Cinanan fervojon en kelkaj lokoj, per kiu la nordaj armeoj kuniĝis kun siaj grandnombraj armeoj en la ekstremo orienta, de kie ili povas komunikadi kaj transporti per ŝipo al Tiencino. Sed ĵus post kiam la naciistoj detranĉis, la japanaj armeoj per minaca perforto ĝin riparis je la 29a de Aprilo, por helpi la nordajn armeojn kaj kelkaj miloj el kiuj en la sekvanta mateno atakis la naciistojn per ĉi-tiu vojo. Tamen ili malvenkis kaj fiine je la Ia, matene, la naciistoj triumfe eniris en la urbon, Cinano'n.

Kiel orde kaj pace la naciistoj eniris en la urbon, Cinano'n.

Pri tio ĉi nun ni lasas al unu alilandano kiu proprokule vidis kaj proprmane skribis jenan korespondaĵon al sia gazeto *Manchester Guardian* en Pekino, kaj la artikolo estis permesite transpublikigita en la ĵurnalo *The China Weekly Review* en Ŝanhajo, fondita de usonoj, ne de ĉinoj. La redaktoro de *The China Weekly Review* Solene aldonis, ke Sro. H. J, Temerley, la skribinto kaj sendinto de ĉi-tiu telegramo estas aŭstralia ĵurnalisto en Cinano, montrante la devenon de ĉi-tiu vera preciza novaĵo:

"Cinano, 2an, Majo —La ĉefurbo de Ŝantuno plenpace sed kun drama rapideco transfalis en la manojn sudajn marde, Ian, Majo, frumatene, kiam la rusaj kirasaj vagonoj gardante la nordajn retirigitajn armeojn foriris, kaj post kelke da sekundoj, la frontaj partoj de naciistaj armeoj atingis la Tiencin-Pukoŭ-fervojan stacion.

La sudaj soldatoj, ĉiuj estas laŭdindaj. Ili aperas amikece al alilandanoj kaj ĉiuj tiuj estas sendanĝeraj.

En la stratoj hodiaŭ flugads naciistaj standardoj kaj la muroj estas kovritaj de afiŝoj por denunci

la nordajn militdiojn. Plej multe da butikoj ree malfermiĝis kaj la konstanta loĝantaro aperis kun bonvolo al sudaj novavenintoj.

Krom iometa streĉo kaŭzita de la japanaj armeoj kiuj estas malantaŭ siaj sablopoketaj defendaĵoj en iaj areoj de la urbo, la situacio estas ĝenerale trankvila."

Kiel komencis la Kruela buĉado. Ankaŭ ĉi-tion ni lasas al la neŭtrala raporto de Sro. H. J. Timperley:

"Cinano, 3an, Majo (I ptm.)—Serioza atako inter ĉinaj kaj japanaj armeej okazis ĉi-tiun matenon, kio evidente estas la rezultato de la serioj da akcidentoj ke naciista oficisto estis pafmortigita hieraŭ kaj naciistaj stratpropagandistoj estis kaptitaj de japanoj.

Laŭ la raporto el la naciista stabejo, tiaj okazintaĵoj estis sekretitaj de la naciistoj por eviti la eksciton de la soldataro. Sed ĉi-tiun matenon, parto de naciistaj soldatoj estis pafmortigitaj de la japanoj, kiam ili pasis en la stratoj, La naciistoj konstraŭstare pafis, tiąm okazis granda konfuzo, en kiu estis multaj viktimoj de ambaŭaj flankoj, en kiuj estas ambaŭ soldatoj kaj civilanoj. La nombro de viktimoj ĝis nun restas nekonata."

Kiel ajn la japanoj malvere pretekstas pri la kaŭzo ke naciistaj soldatoj rabis la japanan butikon, ke dum tio vidante la gardon de japanaj soldatoj, ili antaŭe pafis, sed ĉi tiu raporto neŭtrala restas netuŝebla. Kaj la respondeco apartenas al japanoj. Krome ni povas tute kredi laŭ iliaj agoj: unue kun invada intenco la Japana Registaro ekspedis armeojn al Ŝantuno, kie ili ne havas rajton eniri; due ili malhelpis la naciistojn helpante la nordajn. Klara estas la malbona intenco de Japana Registaro.

Kie preparis la Venenan Artifikon Ekster la okcidenta pordego de Cinano ekzistas areo ĉirkaŭ 200 akreoj. Kie loĝas ĉinoj kaj alilandanoj kaj tre progresas la komercado. Ĉi-tiu areo estis malfesmita al alilanduloj por loĝi kaj komercadi en

1906. Ĝi estas nomata ĉine "Ŝan-pu". Dum la alproksimiĝo de naciistaj armeoj la japanaj armeoj limigis iajn lokojn kie loĝas la japanoj kaj super ili faris regadon kaj defendon. Ĉirkaŭ la limo estis kovrita de multe da sablosakaj defendaĵoj kaj japanaj soldatoj malantaŭe kaŭris direktante siajn pafilojn al ekstero, kavazaŭ la malamiko alproksimiĝis. En ĝi Ĉinaj civilanoj ne havis la rajton eniri. Kaj ĉi-tiu areo estis tiel grava ke unu el la stratoj nomata "Vej Ji Lu" estas la necesa vojo al la fervoja stacio. Tio aperis ne nur malhelpa al la ĉino kiu volas eniri en la areon, sed eĉ malhelpa al tiu kiu volas iri al la fervoja stacio. Post la ripetaj petoj de la naciistaj ĉefoj fine la japanoj konsentis kaj neigis la areon limigitan en la 2a de Majo. Sed tio estas la kruelega artifiko de japanoj, ili retiris la defendaĵojn por ke ĉinoj sciu ke oni jam povas eniri, kaj kiam tiu eniris, tiam ili kaptis kaj pafis pretekstante ke li rabis.

Kiel buĉadis kaj atakis japanaj armeoj ĉinajn civilanojn kaj soldatojn. De la komenco de la konfuzo la japanaj soldatoj ĉien entrudis kaj pafidis per pafiloj kaj maŝinpafiloj sur ĉinajn soldatojn kaj civilanojn. Dum la unua tago, nome en la 3a de Majo, mortigitaj pli ol unu milo la senkulpaj ĉinoj. Iuj el tiuj estis virinoj, knabinoj kaj infanoj aŭ maljunuloj, unuj estis pafmortigitaj, aliaj estis pikmortigitaj en la koroj. Dum la atako la ĉefoj de naciistaj armeoj sendis ĉefajn oficistojn kelkefoje en la danĝero al japana stabejo por peti la ĉeson de pafado, sed la japanoj ilin insultis kaj nenion akceptis. Ili sendis parton de japanaj armeoj, al la oficejo de la Loka Komisioano de Fremdaj Aferoj, eniris en la domon, katenis la Komisionanon, Sro. Cai Kun-Ŝih, fortranĉinte liajn nazon kaj orelojn pafmortigis lin kaj liajn dekkvin oficistojn. Aliaj aroj de japanaj soldatoj estis senditaj al la provizora oficejo de la Ministro de Fremdaj Aferoj kaj organize pafis per maŝinpafiloj. Ili entrudiĝis en la lokon, kie okupis la naciistaj armeojn kaj senarmigis ilin, katenis ilin, pikis ilin. Poste, la naciista flanko jam ĉesis la kontraŭstaron sub la ordo de sia ĉefo kaj retiriĝis malprokismen, la japanaj soldatoj ankorau daŭrigis la pafadon super la civilanoj. Pri ĉio ĉi-tio ni preskaŭ ne povvas priskribi per la mallerta skribilo, nun ni nur enmetas In fotografaĵojn en ĉi tiu kajero por anstataŭi la skribilon.

Japanoj detruis ĉinan senfadenan stacion En Cinano por rompi veran raporton al sekstermondo.

Dum la atako kaj buĉado de japanoj, iaj japanaj aroj estis senditaj kun bombardiloj celruini ĉinan senfadenan stacion. La intenco de tia ago estis rompi verajn raportojn al la ekstera mondo por tute fari la malverajn. Ĉar en la ĝenerala tempo la raportoj el Cinano estis per jenajn fontoj: Unua telegramo laŭlonge de la Tiencino-Pukoŭ-fervojo suden al Nankino kaj Ŝanhajo, dua laŭlonge de la sama fervojo norden al Tiencino kaj Pekino, tria laŭlonge de la Ŝantuna fervojo orienten al Cintao, kaj poste du senfadenoj en Cinano, unu kontrlita de ĉinoj, alia de japanoj. Dum la naciistoj atakis la nordajn armeojn en suda parto de ŝantuno, la fadeno de la unua jam estis detruita de la naciistoj, kiam ili alproksimiĝis al Cinano ili detranĉis la ŝantunan fervojon kaj fadenon de la dua, kaj kiam la nordaj armeoj malvenkite ektreniĝis norden, ili per bombardiloj ruinis ankaŭ la fervojon kaj la fadenon de la tria. Tiam Cinano restis tute ilozita al la mondo escepte la du senfadenaj stacioj. Do kial la japanaj armeoj ruinis la ĉinan senfadenan stacion estas tre evidenta al ni. Tio estas, ili volis fermi la fonton de la veraj raportoj al ekstera mondo, kaj tiam ili, japanoj, povis fari la malverajn laŭ ilia volo. Do el ĉio ĉi-tio ni havas la konkludon pri la kaŭzo de la buĉado: Se ili estis justa, kial ili tion faris?

Pro paco Naciistoj fortiriĝis De Cinano al la fronto.

Post la kruela buĉado de la japanaj armeoj la Konsuloj de Anglio kaj Usono en Cinano konsiliĝis kun la japanaj kaj naciistaj ĉefkomandantoj por ĉesi la akcidenton kaj fine la naciistoj konsentis fortirigi siajn armeojn de Cinano dudek "li" (pli ol ses mejloj), nur restigis necesan nombron da naciistaj soldatoj en la urbo por subteni la pacon kaj ordon, kie loĝas la anglaj kaj amerikaj nacianoj kaj kie estis ekster la areoj de la japanaj defendaj limoj. En la 5a de Majo la ĉefkomandanto de naciistaj armeoj Generalo Ĉian Kai-Ŝek, ankaŭ foriris de Cinano al la fronto. Jen estas lia letero al la japana komandanto Generalo Fukuda:

"Sro. De kiam okazis la malfeliĉa okazaĵo je la tria de Majo, la ĉefkomandanto de la naciistaj armeoj pro la paco, jam severe ordonis siajn soldatojn retiriĝi malproksimen de la najbarejo okupita de japanaj armeoj. Nun ĉiuj naciistaj soldatoj fortiriĝas de siaj postenoj por daŭrigi la Nordan Ekspedicion,

escepte bezona nombro de naciistaj soldatoj estas restigita en la urbo por subteni la pacon kaj ordon.

La naciista ĉefkomandanto ankaŭ foriĝas al la fronto hodiaŭ, kaj ĉi tion vin sciigas esperante ke vi severe ordonos al viaj soldatoj ĉesi la eksterordinaran agon kiel en la lastaj du tagoj por snbteni la ĉiaman amikecon inter du nacioj. Ĉi tio estas lia sincera espero." (La 5an de Majo).

Japana ultimatumo kun kvin sensencaj Postuloj por daŭrigi kruelan buĉadon

Post la foriro de Generalo Ĉian Kai-Ŝek kaj la fortiriĝo de la naciistaj armeoj, la situacio en Cinano restis jam pli kaj pli trankvila, kaj oni eĉ sentiske la ventego estis forfluginta. Sed, japanaj armeoj enirirs en Ŝantunon ja kun ia malbona intenco, ili ne lasis trankvilon kaj feliĉon al ĉinoj. En la 7a de Majo, je la 4a posttegmeze, la japana komandanto, Generalo Fukuda, sendis ultimatumon kun kvin postuloj al la naciistaj oficistoj, kaj templimigis la respondon en dekdu horoj. La sensencaj postuloj estis tiel:

1——Puni la ĉefajn militoficistojn, kiuj estis rilataj al la okazajo.

2——Senarmigi ĉiujn naciistajn armeojn, kiuj genis japanojn, antaŭ la japanaj armeoj en Cinano.

3——Forte malpermesi kontraŭ-japanajn propagandojn en la teritorioj sub la regado de naciistaj Armeoj.

4——Fortirigi ĉiujn naciistajn armeojn en la areo proksime 20 "li" de Cinano kaj 20 "li" laŭlonge de la Cinan-Cintao Fervojo.

5——Fortiri ĉiujn naciistajn armeojn, kiuj restas en Ŝinĉuano kaj Ĉanĉuano, en dekdu horoj.

La japana komandanto, Ganeralo Fukuda, estis sufiĉe ruza, malhonesta. Li sciis ke la naciista, sola ĉefkomandanto foriris al malproksima urbo, Taiano, ke la tempo por transdemando al li ne estis sufiĉa, ke la aliaj ĉefaj ofieistoj ne havas tian potencon por decidi kaj respondi ĉi-tiujn postulojn. Malgraŭ la peto de ĉefo de la naciista politika komisionano en la fronto, Generalo Ĉian Co-Pin, por prokrasti iometan tempon, Fukuda ordonis siajn armeojn eksplodi subitan atakon kaj buĉadon en la mateno de la 8a, je la tria horo. Kaj ĉi-tiun fojon ili eĉ entrudiĝis en la areon pli malproksiman ol 20 "li".

Kiel daŭris la kruela kaj sovaĝa atako Kontraŭ naciistaj soldatoj en murita urbo.

Dum sia foriro la naciista ĉefkomandanto ja sciigis al la japanaj ĉefoj

ke li restigas nur bezonan nambron da naciistaj soldatoj en la murita urbo por subteni la ordon kaj pacon, kie loĝas proksimume kvin miloj da civilanoj. Kaj ĉi-tio ja estis konsentita de japanaj ĉefoj antaŭ lia foriro. Sed, de la 8a de Majo, frumatene, la japanaj armeoj komencis ataki tiujn armeojn naciistajn. Ili atakis per la kampkanonoj, bombkanonoj, maŝinpafiloj kaj aerplanoj super la murita urbo, kie loĝas tiel multe da civilanoj. Tiel sovaĝa ago komence de la 8a de Majo daŭris ĝis la 11a, tiam kiam la naciistaj soldatoj presaŭ tute mortigitaj kaj nur unu parteto kun serioza vundo forkuris el la murita urbo. Kiel estis la civilanoj? kaj kiel estis la konstruaĵoj? Pri ĉio ĉi tio ni preskaŭ ne povas senkompate esprimi. La murita urbo ja restis ruina kaj la civilanoj kiel vunditaj ratoj. Unuj perdis kapon aliaj perdis piedojn kaj iuj ne havis brustojn. Maljunuloj perdis siajn junulojn, kaj junuloj perdis maljunulojn. Ili havis nek parencon nek domon.

PROTESTOJ, PLENDOJ KAJ VOKOJ EL ĈIUJ ANGULOJ

Post la kruela buĉado de japanaj armeoj en Cinano, kaj vidinte la senfinan kruelan aranĝon de Japana Registaro, ĉinoj koleris, indignis. La protestoj, plendoj kaj vokoj elfluis el ĉiuj anguloj kontraŭ la Japana Registaro. Jen el ĉi-tiu amaso ni eltiras la plej gravajn de la Naciista Registaro, Naciista Partio kaj de Ĉinaj Esperantistaroj:

PROTESTA NOTO DE ĈINA MINISTRO EL CINANO

Pri la ekspeds de japanaj armeoj al Ŝantuno invadanta nian mastran rajton, la Naciista Registaro jam donis protestojn dufoje kaj, deklaris ke, se malfeliĉe eklevigos malbonan rzultaton, ĝin devas ŝarĝi la Japana Registaro k. t. p., Surprizige, je la 3a de Majo, matene, la japanaj armeoj el Cinano sen nenia kaŭzo faris seriozan inciton, senkompate pafis sur niajn soldatojn kaj popolojn. La Naciista ĉefkomandanto tuj ordonis siajn soldatojn foiri malproksimen de la loko kie okupis la japanaj soldatoj, kaj samtempe ĉefajn militistajn oficistojn rapidi al japanaj stabejoj por aranĝi rimedojn haltigi la pafadon. Sed ili revenis ofenditaj sen rezultato. La japanaj soldatoj, per maŝinaj pafiloj pluve pafifs ĉirkaŭ la proksimajn

lokojn kaj ripete direktigis siajn bombardilojn al la konstruaĵoj de registaro kaj de civilanoj. Aro da japanaj soldatoj estis senditaj ataki la oficejon de Komisionano de Fremdaj Aferoj por Ŝantuno, fortranĉinte liajn nazon kaj orelojn de Sro. Cai Kun-Ŝih, la Komisionano, pafmortigis lin kaj lian oficistaron. La oficejo de la Ministro de Fremdaj Aferoj ankaŭ estis pafita kaj serĉita de organizitaj japanj soldatoj. Multaj senkulpaj ĉinaj soldtoj kaj civilanoj estis mortigtaj ĉi-tiun fojon. La japanaj soldatoj entrudiĝuis en la lokon kie okupis la naciistaj soldatoj, kaj perforte senarmigis ilin, kiuj tolere sindenis. En la sama tago je la 2a horo, nokte, kiam niaj ĉefaj militistaj oficistoj konsiliĝis kun Kolonelo Kuroda, la japapa ĉefstabisto, por aranĝi la aferon, japanaj soldatoj pafis per bombardiloj kvinfoje. Kaj japanaj soldatoj ankaŭ estis senditaj detrui nian senfadadenan stacion. En la 4a de Majo, kvankam jam neniu ĉina soldato restis kie ajn proksime de la loko, kie okupis la japanaj armeoj, ili ankoraŭ pafadis, ĝis nun la komunikado kaj komercado en la tuta urbo estas interrompita kaj haltigita. Komdamneblaj agoj kiel ĉi-tiuj, ne nur tute piedpremas la majstran rajton de Ĉinio, sed ankoraŭ absolute malpermesitaj de humana justeco.

Nun, la Naciista Registaro ripete donas fortan proteston al Japana Registaro kaj la Japana Registaro estas petata tuj instrui iliajn armeojn en Cinano per telegrafo por haltigi ilian pafadon, kaj, tuj retiri la armeojn, kiuj piedpremas la internacian leĝon kaj detruas la kontraktatajn kondiĉojn. La tuta problemo estos solvita per konvenaj rimedoj. La Naciista Registaro deklaras nun ke, ĝi reservas ĉiujn demandojn, kiuj estas necese proponotaj. Nesupozeble, la Japana Registaro ne volas fari ian netolereblan malamikecon kontrau la tuta ĉina raso, kaj kontraŭ la mondaj justeco kaj humaneco.

Van Fu

Ministro de Fremdaj Aferoj.

La 4a de Majo, 1928.

PLENDO DE NACIISTA REGISTARO AL LA LIGO DE NACIOJ

Al
S–ro J. E. Drummond,
Ĉefsekretario de Ligo de Nacioj,
Ĝeneva.

En la nomo de la Naciista Registaro de Ĉina Respubliko, mi, la prezidanto de la dirita Registaro, vin petas atenti la gravan situacion, kiu ekleviĝis de la ekspedo de multnombra soldataro japana en Cinano, ĉefurbo de provinco Ŝantuno, kaj de ilia militsimila ago kontraŭ Ĉinio.

Je la tria de Majo, japanaj armeoj kiuj estis en Cinano, la ĉefurbo de Ŝantuno, ekpafis sur ĉinajn soldatojn kaj civilanojn, kiuj ne sindefendis, kaj ree ekkanonpafis ĉirkaŭ la loĝejan kvartalon ĝis fine mortigitaj pli ol unu milo. Kiel terure estis, kiam multaj japanaj soldatoj entrudiĝis en la oficejon de nia Loka Komisionano de Fremdaj Aferoj en Cinano, lin katenis kaj, fortraĉinte orelojn kaj nazon, pafmortigis lin kaj lian oficistaron en la sama loko.

La 7an de Majo, la ĉefo de japanaj armeoj en Cinano sendis skribaĵon kun senrezonaj, neeblaj postuloj al nia ĉefkomandanto, kaj tempolimigis en dekdu horoj por respondi. Ne atendante nian respondon, japanaj armeoj ekkomencis militsimilan agon pli vaste kaj pli forte, kiu ĝis nun, kiam telegrafas mi, ankoraŭ ne ĉesas, ili dissendadas multe da armeoj landaj kaj maraj al ĉinajn teritoriojn. Malgraŭ tio, niaj armeoj nun sindetenas tutpace sub la ordonoj de Registaro.

Mi do vin atentigas pri la fakto, ke la teritoria honesteco kaj politika sendependeco de Ĉinio nun estas tuŝitaj kaj la paco internacia estas minacata de la invado de Japanio. Vi estas petata tuj venigi la kunvenon de l' Ligo, laŭ la paragrafo 2a de l' artikolo XI de la Liga Interkonsento. Urĝe estas ke la

Ligo ĉesigu la militon de japanaj armeoj kaj foririgu ilin for de Ŝantuno. Pri la fina solvo, Naciista Registaro profunde komprenante sin justeca, atendas la inter nacian esploron aŭ arbitracion.

Tan Jen-Kai

prezidanto de Naciista Registaro

La Ian de Majo, 1928.

PLENDO DE NACIISTA REGISTARO AL LA PREZIDANTO DE USONO

Al S-ro Coolidge,
Prezidanto de Usono.
S-ro.

Kiel prezidanto de Naciista Registaro de Ĉina Respubliko, mi volas vin atentigi pri la fakto ke japanaj armeoj jam invadis en Ŝantuno'n kaj efektivigas la militon kontraŭ Ĉionio.

Ili mortigis nian Komisionanon de Fremdaj Aferoj kaj lian oficistaron, kaj multfoje pafis sur niajn civilanojn.

Ankoraŭ pli multe da japanaj armeoj nun estas ekspeditaj al la dirita provinco.

Ni estas entute en plej sindetena situacio, fidante ke la kaŭzo de Internacia Paco kaj Justeco estas komuna koncerno de civilizaciaj nacioj. Ĉiuj niaj popoloj memoras ke la antaŭe fina solvo de la Ŝantuna problemo estis efektivigita de la bonaj oficoj de amikecaj Potencoj, precipe Usono. Nun ni volas scii la intencon de Amerika Registaro kaj popoloj pri tiu-ĉi grava situacio kreita de Japanio.

Tan Jen-Kai,
Prezidanto, Naciista-Registara Konsilantaro.

La 12an de Majo, 1928.

MANIFESTO DE NACIISTA PARTIO AL LA POPOLOJ DE ĈIUJ AMIKECAJ NACIOJ

Naciista Partio de Respubliko Ĉina nun atentigas la popolojn de ĉiuj amikecaj nacioj pri la kruela buĉado de japanaj armeoj en Cinano, Ŝantuno, ke tia kontraŭhumana, leĝon internacian detruanta, bruta abomenaĵo naskis al ĉinaj popoloj netolereblan ofendiĝon.

Pro la unuiĝo kaj paco de Ĉinio, Naciista Registaro direktis siajn armeojn al Pekino, kaj kelkfoje ripetis ke ni protektas la vivon kaj propraĵon de alilandanoj. Sed ĵus kiam la naciistaj armeoj ekatingis Cinanon, Japana Registaro sub Tanaka Administracio malatentante la mastran rajton de Ĉinio, sendis armeoj por invadi ĉinan teritorion. Kaj multnombra soldataro ekokupis en Cinano kun evidenta minaca motivo.

La 3an de Majo, la trian tagon de ekokupado de naciistaj armeoj en Cinano, japanaj armeoj kiuj restis en tiu urbo, subite, serĉis incitigaĵon, per maŝinaj pafiloj pafis sur ĉinajn soldatojn kaj civilanojn eĉ virinojn kaj infanojn, fine pli ol 1,000 homoj senkulpaj estis mortigitaj. Ili sin entrudiĝis en la oficejon de Cai Kun-Ŝih, la Naciista Komisionano de Fremdaj Aferoj en Ŝantuno, lin katenis, fortranĉis nazon kaj orelojn kaj post tiu-ĉi brutaĵo pafmortigis lin kaj dekkvin liajn oficistojn. Antaŭ foriro de l' oficejo ili bruligis la tutan konstruaĵon. Poste, ili entrudiĝis en la provizoran oficejon de l' Naciista Ministro de Fremdaj Aferoj, organize ekpafis kaj serĉis. Kaj ĉi-tiu oficejo kun aliaj oficejoj kaj loĝejoj de civilanoj proksimaj estis ruinigitaj de iliaj bombardiloj. La stacio senfadena en Cinano estis ankaŭ detruinigita.

Rimarkinte la falsajn propagandojn de japanaj aŭtoritatoj, renversantajn la veran kaj malveran,

ni estas devigataj telegrafi al vi, popoloj de ĉiuj amikecaj nacioj, por vin sciigi tion, kio vere okazis. Ĝi estas evidente ke japanaj militdioj intencas malhelpi la unuiĝon de Ĉinio per ĉi-tiu ventego, kaj interrompi al ĉinoj la simpation de aliaj popoloj en la mondo. Ni klare rigardas ke naciista movado jam delonge naskiis al fremdaj popoloj simpation, do ni honeste proklamas por peti la justan juĝon.

Centra Ekzekutiva Komitato, Kuomintan.

La 8an, Majo, 1928.

ALVOKO DE NAKINA ESPERANTO-ASOCIO

Karaj Esperantistaroj kaj Ĉiuj Civitanoj de Ĉiuj Nacioj!

Kun grandega kordoloro ni nun plendas al vi pri la kruela atako de japanaj soldatoj en nia lando:

Kiam la naciistaj armeoj daŭre direktis sin norden, por forbalai la feŭdalismajn militistaĉojn kaj por tiel unuigi Ĉinion la NaciistaRegistaro jam proklamis kelkfoje, ke ĝi protektos la alilandanojn, kiuj loĝas en Ĉinio. Sed la Japana Registaro, malgraŭ tio, maljuste sendis multajn soldatojn al Ĉinio, ordonis ilin entrudiĝi en nian propran teritorion Cinanon, la ĉefurbo de Ŝantuno, protekstante ke ili protektos siajn loĝantojn. Kaj subite, la 3an de majo, ĵus kiam la revoluciistaj armeoj venkinte eniris en Cinanon, la japan j soldatoj atakis niajn soldatojn kaj civilanojn en la tute paca cirkonstanco. Pli ol unu milo da senkulpaj virinoj, infanoj kaj soldatoj estis pafmortigitaj. Ili perforte entrudiĝis en ŝantunan diplomatan oficejon, katenis la ĉefoficiston S-ro Cai Kun-Ŝih kaj dekkvin oficistojn, fortranĉis iliajn orelojn kaj nazoĵn kaj pafmortigis ilin. Poste, ili forbruligis la oficejon. Ĉiuj aliaj oficejoj ĉhinaj, multaj loĝejoj kaj senfadena stacio estis celruinigitaj.

Ni, ĉinoj, ankaŭ posedas soldatojn tute armigitajn, pafilojn kaj kanonojn, ankaŭ povus ataki ilin,

se ni volus; sed ni amas la justecon, ni tute ne volas detrui la pacon orientan, la pacon mondan, tial ni ne agis maljuste kiel Japana Registaro, nia Registaro jam ordonis niajn soldatojn foriri malproksimen de la loko, kie okupis japanaj soldatoj. Tamen, kiel agas la Japana Registaro? Ĝi sendadas kelkajn dekmilojn da soldatoj, ordonis daŭrige antŭen entrudiĝi en nian landon. Nun ili jam rabis niajn fervojojn, la oficejojn de telegrafo kaj de te'efono en Cinano, kaj kanonpafas senĉese la urbanojn. La 9an de Majo, ili kanonopafis p'i ol dekmilfoje, nekalkuleblaj estis niaj mortigitoj. De aliaj vojoj, Japana Registaro sendadas kelkdek militŝipojn, diseniri en Ĉinajn havenojn.

Do vi juĝu, karaj Esperantistoj kaj ĉiuj nacianoj, la malbona intenco de imperialisma Japana Registaro jam tute malkaŝiĝas antaŭ viaj okuloj. Tio ĉi certe sentigas al vi indignon kontraŭ la Japana Registaro kaj konscienco vokas vin protesti kontraŭ malica agado de Japanio! Ĉar ĝi ne estas nur la ofendaĵo kaj honto de Ĉinio, ĝi ankaŭ estas tiuj de la mondo, kaj de la homaro! Ni, kiuj amas la pacon mondan, ne lasu tian imperialismon resti en nia paca mondo!!

Nankina Esperanto-Asocio

La 10an de Majo, 1928.

DEKLARACIO DE ŜANHAJA ESPERANTO-ASOCIO

Jam de longe la Japana imperialismo rigardis la nordan parton de Ĉinio kiel sian propran teritorion, kie dank'al la maljustaj kontraktoj, kiujn ĝi interkonsentis kun la militdioj Ĉan Co-Lin kaj Ĉan Ĉun-Ĉan, kolonizas la tutan teritorion, faras enterprenojn, kaj ĝuas multajn favorajn rajtojn.

Sed antaŭ tri semajnoj, kiam la naciistaj armeoj estis atingontaj Cinano'n (La ĉef.urbo de Ŝan-

tuno provinco) kaj militdio Ĉan Cun Ĉan estis forpelota, la Japana Registaro bone scias ke ĉiuj ĝiaj favoraj rajtoj, iom post iom perdiĝos en la plej proksima tempo.

Tial ĝi en tiu tempo pretekstante ke ĝi devas protekti siajn loĝantojn kiel eble plej rapide, sendis unu divizon da soldatoj al Ĉinano kaj atakis la naciistajn armeojn.

Je la naŭa horo, 3an de majo antaŭtagmeze, post kiam la naciistaj armeoj atingis Cinanon iu predikisto el la naciistaj armeoj, paroladis pri politika stato al la popolamaso, la Japanaj imperialismaj soldatoj malpermesis lin tion fari. Tiam la disputo inter du flankoj komenciĝis, sekve kontraŭ la ĉinaj amasoj la japanaj soldatoj pafadis, kaj preskaŭ ĉiom da tiu ĉi loka taĉmanto de naciistaj soldatoj estis sen-armigita kaj malliberigita en la poŝtoficejo.

En tiu ĉi tempo la Japanaj soldatoj ĉiuloke atakadis kiel frenezaj hundoj, ne diferencigante pri soldatoj kaj komerciistoj, la mortigitoj kaj vunditoj ĉie troviĝis. Post la deka horo Japanaj soldatoj plie pafis per kanonoj la belajn komercajn lokojn kaj en la daŭro de ne pli ol unu horo ĉiuj grandaj konstruaĵoj estis detruitaj. La naciista Generalo Ĉan Kai-Ŝek timante ke tiu ĉi grava afero fariĝos pli granda, malpermesis al siaj soldatoj konstraŭstari al la japanaj soldatoj, sed la japanaj soldatoj ankoraŭ daŭrigis sian pafadon eĉ malgraŭ ĉiaj admonoj de la konsuloj de ali- landoj.

Per tiuj kruelaj agadoj la japana imperialismo tute okupas Cinanan urbon. Pli terure estis la fakto, ke dum la malpaco daŭris, kelke da japanaj soldatoj ekiris en la oficejon de la diplomato, kaj ĉiuj oficistoj kaj diplomato Cai Kun-Ŝih estis mortigitaj.

Tuj flugis tra ĉiuj urboj kaj provincoj tiu ĉi novaĵo kaj la kontraŭa movado ĉie fluas kiel ondegoj.

Ŝajnas al la Japana imperialismo ke la forta premado estas la sola efika rimedo, sekve post tiu ĉi

tago, la Japana Registaro seninterrompe sendis multajn soldatojn al ĉiuj grandaj urboj laŭ longe de la marbordo de Ĉinio.

Laŭ la raporto de la ĉiu tagĵurnaloj, du miloj da personoj estis mortigitaj.....

Ŝanhaja Esperanto-Asocio

JAPANA REGISTARO SENĈES EKSPEDIS ARMEOJN LANDAJN KAJ MARAJN AL ĈINAJ TERITORIOJ

La Japana Registaro imperialisma ja sufiĉe sovaĝa, ĝi agis kiel antaŭ dudekcent jaroj, krom miliforton nek justecon nek humanismon ĝi scias. Post la kruela buĉado en Cinano ĝi ankoraŭ abunde sendadis armeojn landajn kaj marajn. Ili entrudiĝis en ĉiujn havenojn de Ĉinio, surrampis sur ĉiujn ĉinajn teritoriojn, ekzemple Ŝanhajo, Hankoŭo, Kiukiano, Vufuo, Foĉoŭo Kantono, k. t. p. Tie ili amasigis sablopoketojn kiel defendaĵojn en milittempo kaj preparis la pafilojn aŭ maŝinpafilojn malantaŭ la defandaĵoj celante al ĉinaj civilanoj kiuj preter pasis, ĉi-tie ili staris senmove kun preparitaj pafiloj en manoj kaj kiam ĉinoj preter pasis, movigis la maŝinon kvazaŭ volis tuj pafi. La celo estas klara, ke ili intencas fari aliajn kruelajn buĉadojn en Ĉinio.

DEKLARACIO DE JAPANA REGISTARO PRO LA ALDONA EKSPEDO

Kiam antaŭ nelonge la malkvieto en Ĉinio minacas al Cinano la Japana Registaro ekspedis armeojn por protekti japanojn loĝantajn en tiu regiono kaj klarigis pri sia tenigo. Sed de tiam, kiam okazis la malfeliĉa akcidento en Cinano, la situacio en tiu distrikto disvolviĝas en gravecon ke la nuna forto de japanaj armeoj nesufiĉas por protekti la japanajn loĝantojn. La ŝantuna fervojo kuniganta Ciñtao'n kun Cinano.

estas detruita en diversaj lokoj, prezentante malfacilan situacion por subteni la nunan komunikadon.

Sekve tio estas decidita ke ekspedi la Trian Divizion al Ŝantuno pro la celo de bona protekto al la japanaj loĝantoj kaj de forta subteno de ŝantuna fervojo. Nuna ekspedo de aldonaj armeoj kiel supredirita, estas por protekti japanajn loĝantojn en Ŝantuno kaj por subteni la necesan por tia celo komunikadon de ŝantuna fervojo. Ĝia celo neniom diferancas de la unua ekspedo de armeoj.

Kune kun la ekspedo de la Tria Divizio nun estas decidita sendi kvin aliajn arojn el Japanio al Tiencino. Ili estis laŭ la originala formulo sendotaj en la venonta Julio por austataŭi la periodan malŝarĝon de japana garzono en Ĉinio, sed nun iom fruigas la daton pro la cirkonstanco ke la parto de garnizono estis sendita al Cinano kiel la urĝa rimedo.

Tio ankaŭ estas decidita sendi plue kelkajn krozŝipojn kaj detruŝipojn al Janci Rivero kaj Suda Ĉinio pro la celo de protekto al japanaj loĝantoj, se okazos la akcidento kaŭzita de la malkompreno de la afero en Cinano.

La nuna ekspedo de aldonaj armeoj kaj militŝipoj havas nenian celon krom celon de protekto al la vivo kaj proprajo de japanaj loĝantoj kontraŭ tiel malfeliĉajn akcidentojn, kiuj eble povos okazi rilate al cinana afero. Kaj tio estas apenaŭ aldonita, ke ili estos retirigitaj kiam la okazo permesos nenian necesson por ilia daŭra subteno.

La 9an de Majo, 1928.

DEKLARACIOJ DE JAPANAJ MODERNAJ PARTIOJ KONTRAŬ JAPANA REGISTARO

Post la kruela sovaĝa buĉado de japanaj armeoj en Ŝantuno, de la 3a ĝis la 11a de Majo, la ekstera mondo

jam far ĝis tumulta, en la gazetoj, ĵurnaloj aperadis abunde artikoloj pri tiu okazaĵo, aŭ ĉinalingvaj fonditaj de ĉinoj aŭ de alilandanoj, kaj plej multe estis tiaj kiaj serioze kritikis la maljustecon, malbonaintencon de la Japana Registaro. Nun ni ne citas tiujn de ĉinoj, kiuj ĉiuj indignas kaj koleras kontraŭ Japana Registaro, nek t ujn de alilandanoj (krom japanoj) kiuj el sia neŭtrala vidpunkto kontraŭas la Japanan Registaron, ni nur citas la opinion de japanaj partioj kiuj ĉiam amas sian registaron. El ĉio ĉi-tio ni povas scii ke kiel ili kontraŭstaras ankaŭ Japanan Registaron.

Demokrat-Socialista Partio....." Pri la grava rezultato kaŭzita de la politiko de la malbona kabineto kondukata de Generalo Tanaka ke instigas indignon de ĉina popolo, ni jam delonge antaŭsentis, tial dum la lasta urĝa kongreso ni decide kontraŭstaris. La sumo elspezita de ĉi-tiu ekspedo atingas 15,000,000 jen. Tia granda sumo ja sufiĉas igi la loĝantaron transloĝi de la danĝera loko por sin ŝirmi. Sed tian rimedon ne alprenis la Japana Registaro, pro la profito de malmulte da burĝoj. Insistante la lokan protekton, la Japana Registaro ekspedis armeojn al Ŝantuno, persekutis la japanajn loĝantojn kiel la oferon de sia politiko. Kaj la efektiviĝo de tia politiko eble minacas al pacon de orient-azio....."

Japana Laborist-Kampana Partio....." La Tanaka Kabineto en la nomo de protekto al japanaj loĝantoj nun daŭras ekspedi armeojn al Ŝantuno. En la realo, la celo de tia ago estas por subteni la profiton de malmulte da riĉuloj kaj la estingiĝantan sorton de la kabineto. Krom elprenita el la nacia fianca fonto ĉirkaŭ 5,000,000 jen, la sumo pli ol 10,000,000 jen kredeble estas elprenita el la mano de japana popolo..... Ĉi-tiu okazintaĵo en Cinano estas la rezultato de la politiko de militdio....."

Proletaria Partio....." La rezonoj de nia konstraŭo al la ekspedo estas tiaj: (1) El la vidpunkto de historio, ni vidas ke ekspedo al Ŝantuno estas por subteni la ĉinajn nordajn militdiojn, malhelpas la progreson de ĉina naciista revolucio, kaj naskos trudiĝon al ĉina interna politiko. (2) Ekspedi armeojn al la loko, kie loĝas la japanoj, sufiĉe donas al ĉinoj indignon pri la invado al teritoria rajto, kaj tiam

niaj loĝantoj estos pli multe en danĝeso. Se oni pensas pri la vera profito de popolo, neiel davas ekspedi armeojn al Ŝantuno. (3) Subteni la akiritan rajton, kiel diri, estas por subteni la kapitalistojn de japanio enŜantuno. La japana popolo ne estu allogita de tia politiko, ne kolpodu subteni la profiton de kapitalistoj kaj ne estu helpi la ĉinajn nordajn militdiojn kaj subpremi la ĉinan naciistar novadon....."

LA SUKCESO DE NORDA EKSPEDICIO DE NACIISTAJ RMEOJ KAJ LA MINACO DE JAPANA REGISTARO

Post la kruela buĉado de japanaj armeoj en Cinano por malhelpi la disvolviĝon de la Norda Ekspedicio de naciistaj armeoj, la Naciista Registaro sub kiel ajn malfacileco decidis plenumi sian gravan taskon. Pro la malhelpo de japanaj armeoj en Cinano, ĝi do ŝangis sian destinitan vojon por Norda Ekspedicio. Post siaj penadoj fine la naciistaj armeoj venkante marŝis norden, disigis nordajn militdiajn armeojn en ĉiu flanko kaj pli kaj pli proksimiĝis al Pekino kaj Tiencino. Vidante ĉi-tion, la Japana Registaro ektimis kaj la alia artifiko tuj naskiĝis al ĝi. Pretekstante pro la paco kaj ordo en Manĉurio ĝi ree volis sendi armeojn al norda Ĉinio por malhelpi la Nordan Ekspedicion de Naciista Registaro. Jen estas la minaca noto de Japana Registaro:

MINACA NOTO DE JAPANA REGISTARO PRO LA REVULUCIO EN NORDA ĈINIO

La vivado de la loĝantoj en Ĉinio estas karakterizita en ekstremajn maltrankvilon kaj ĉagrenon, de la konstanta malkvieto kiu jam longiĝis multajn jarojn en tiu lando; kaj la alilandaj loĝantoj ĝuas ankaŭ nenian certecon de l' sendanĝereco en la persekutado de iliaj okupoj.

Sekve, tio estas la sama deziro de ĉinoj kaj alilandanoj ke, plej rapide kiel eble finiĝu la malkvieto

por efektivigi la unuigita kaj paca Ĉinio, precipe entuziasme deziata de Japanio, kiu estas proksimega najbaro de Ĉinio kaj kies interesoj rilatas al Ĉinio speciale kaj profunde.

Tamen, la malkvieto nun minacas al Pekino kaj Tiencino, kaj ni timas ke Manĉurio estos afektata.

La Japana Registaro ege atentas pri la subteno de la paco kaj ordo en Manĉurio, kaj preparas fari ĉion, kio povos haltigi la okazon de tia situacio kiam la paco kaj ordo estos konfuzataj aŭ okazonta konfuzo.

Tial, se la malkvieto envolvos Pekino'n kaj Tiencino'n kaj la situacion minacos la pacon kaj ordon en Manĉurio, la Janana Registaro eble estos devigata preni ian taŭgan, efikan paŝon por subteni la pacon kaj ordon en Manĉurio.

Sed tion devas rimarki, ke la politiko de Japana Registaro kiel ajn restas senŝanĝa kaj inter ĉinaj batalistoj ĝi sindetenas neŭtrala. Do, se iam prenos tiun suprecititan paŝon la Japana Registaro zorgeme rimarkos la tempon kaj rimedon por ke ne levigu ian maljustan rezultaton al kiu ajn el la du kontraŭaj partoj.

NOTO DE ĈINIO KONTRAŬ JAPANIO

La Naciista Registaro havas honoron sciigi pri la ricevon de la Noto datita je la 18a de Majo de la Imperia Japana Registaro kaj ke ĝin jam notis.

Pro la forigo de siaj suferoj, ĉinaj popoloj entreprenas la taskon de politika rekonstruo, por efektivigi la konstantan pacon kaj unuigon de sia lando, por ke vivu en sendanĝereco kaj prospereco kaj pliigu la feliĉon de alilandanoj loĝantaj en Ĉinio. La militaj agoj, kiujn la Naciista Registaro devigite entreprenas por realigi la suprediritan deziron, nun atingas la lastan ŝtupon. La naciista Registaro estas konvinkita ke

en la mallonga tempo, la paco kaj unuiĝo de Ĉinio estos realigitaj; kaj kredeble la Naciista Registaro plej zorgeme atentos kaj taŭge aranĝos la protekton al la vivo kaj proprajo en la militareo antaŭe kaj dume, kiam la milito okazos.

Pri la subteno de paco kaj ordo en la Tri Orientaj Provincoj, en kiuj ege prosperas la komercado kaj loĝas multe da alilandanoj, la Naciista Registaro prenos taŭgajn kaj kontentigajn rimedojn, por ke ĉinoj kaj alilandanoj ĝuu bonegan protekton. Ĉi-tiu respondeco restas sole al Ĉinio. Sed, en la suprecitita Noto de la Imperia Japana Registaro estas esprimita interalie ke la Imperia Japana Registaro estos devigita entrepreni taŭgajn kaj efikajn rimedojn por subteni la pacon kaj ordon en Tri Orientaj Provincoj. Tiuj rimedoj ne nur entrudiĝos ĉinajn hejmajn aferojn sed ankaŭ kalre kontraŭas la principon de reciproka respekto al teritoria rajton en internacia leĝo. Tiajn rimedojn la Naciista Registaro neniel povas permesi.

Tio estas la kora espero de Naciista Registaro ke la Imperia Japana Registaro pro la subteno de konstanta amikeco inter du nacioj, evitos kiajn ajn agojn kiuj estos malhelpaj al la disvolviĝo de amikecaj rilatoj.

La 29an de Majo, 1928.